Esperanto en Danio

32-a jarkolekto • n-ro 3 • aŭgusto 2025

Esperanto en Danio
membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la prezidanto:
Peter Wraae
Eremitageparken 17 st, C
2800 Lyngby
☎ 60 70 79 69 peter@wraae.dk

Ĝirokonto de DEA: 8411-41 88 386

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:
Finn Østerbæk (kasisto)
Ileana Schrøder (vicprezidanto)
Jens S. Larsen (sekretario)
Bent Jensenius, Tobias Nowak
Wolfgang Kirschstein

Redakcio kaj aranĝo:
Ileana Schrøder kaj
Wolfgang Kirschstein
pasalupo@gmail.com aŭ
eed@esperanto.dk

Presado:
Land Trykkeri Dokka, Norvegio

Adresŝanĝoj al:
Finn Østerbæk ☎ 24 96 04 45
finnoesterbaek@gmail.com

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.11.2025

Enhavo

El la redaktejo.....3
Impresoj pri la 110-a UK en Brno.....4
Rezolucio de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno.....5
Ni savu UNESKO-kurieron en Esperanto.....7
Reimagataj muzeoj: la laste aperinta eldono de Unesko-Kuriero 8
Kalendaro.....9
Nova kursmaterialo.....11
Vizito al la bieno Ågård de Michael kaj Victoria Branebjerg.....12
La 111-a UK okazos en 2026 – en Graz, Aŭstrio.....14
Gvidlibro por umantoj.....15
Esperanto per komputilo.....16
Nova estraro de UEA.....18

El la redaktejo

Karaj legantoj. Nova redaktanto bezonata. Ĉi tiu estas unu el la lastaj numeroj de via bulteno, redaktitaj de mi. Nuntempe mi estas plej ofte en Germanio pro la servutuloj de la “dana domo de familia juro”. Ili rifuzis edziĝon al mia partnero kaj mi. Ili krome insistis, ke mia partnero forlasu la landon, aldonante moke, ke ni ja povus edziĝi alilande. Tion ni do faris kaj sekve mi nur foje estas en tiu lando, kiun mi (iom stulte) rigardis kiel mian duan hejmlandon. Feliĉe mi daŭre estas homarano kaj mondcivitano.

Mi certas, ke troviĝas inter nia diligenta kolegaro kompetenta nova redaktanto.

Pro tio ĉi tiu numero de *Esperanto en Danio* atingas vin eĉ pli malfrue ol kutime. Mi ne kapablis ekredakti tuj post la limdato.

Vi trovos en la numero artikolojn pri la multfaceta aktivado en- kaj eksterlande. Impresoj pri la ĵus finita UK, anonco de la sekva kaj diversaj aliaj kontribuoj. Ni esperas, ke vi trovas la legadon inda je via tempo.

Wolfgang Kirschstein

Impresoj pri la 110-a UK en Brno

En la kongreso partoprenis ĉirkaŭ 1100 personoj el 62 landoj. Ĝi okazis en granda universitato en du apudaj konstruaĵoj, kiuj bone taŭgis por la evento, kaj granda halo por la komunaj eventoj. Pro malbona vetero la komuna foto estis farita en la halo ĵus post la solena malfermo.

La kongreso estis bone anoncita en la amaskomunikiloj kiel ĉeĥaj gazetoj, radio kaj televido. Ĉe la akceptejo estis tabulo en kiu oni – dum la kongreso – sciigis en kiuj amaskomunikiloj estas informoj pri nia kongreso.

La unua programero, la kutima movada foiro, estis tre impona kun ĉirkaŭ 100 budoj. Pro malbona vetero oni haste ŝanĝis la okazaĵon de surĉiela afero al endoma. Tial ĝi estis iomete superplena.

Dum la kongresa temo, Esperanto kaj Teknologioj, ofte estis menciita la timo, ĉu maŝintradukado malpliigas la deziron ĉe homoj lerni fremdajn lingvojn. Tio verŝajne estas la kazo por naciaj malfacile lerneblaj lingvoj sed eble ne koncerne Esperanton. Dum la kongresa temo Rakoen Maertens parolis pri falsaj novaĵoj. Aktuala problemo sen evidenta solvo. (En Esperantujo ni jam konas tiun problemon de 138 jaroj).

Unu el la novaj programeroj estis lernado de lingvoj pere de origamio (japana paperfaldado).

Grava prelego estis demenco kaj dulingvismo. La preleganto, juna itala psikologo, asertis, ke dulingvanoj ekhavas demencon kvin jarojn pli malfrue ol aliaj. Bona novaĵo por esperantistoj.

Mi loĝis private, kun familianoj, kaj tial mi ne partoprenis en noktaj eventoj, ekzemple mi maltrafis la kongresan balon en kiu distris Kimo kaj lia filo Bugge Bang.

Bent Jensenius

Rezolucio de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno

Inter la 26-a de julio kaj 2-a de aŭgusto 2025 kunvenis 1132 homoj el 63 landoj en Brno, Ĉeĥio, por partopreni en la 110-a Universala Kongreso de Esperanto. Ni diskutis la temon *Esperanto kaj teknologioj kiel pontoj de paco kaj konfido inter la popoloj*. Samtempe ni ilustris per nia propra agado, kiel bone la internacia lingvo Esperanto servas kiel ponto inter malsamlingvanoj el diversaj landoj kun diversaj spertoj kaj opinioj. Limiginte la traktadon de novaj teknologioj al ties komunikaj aspektoj, ni verkis raporton kaj surbaze de ĝi tiun ĉi rezolucion:

- Kun ĝojo ni konstatas, ke la novaj komunikaj teknologioj ebligis signifan kreskon de la nombro de praktike atingeblaj Esperanto-parolantoj, pro kio la kono de Esperanto en konektita mondo fariĝas ĉiam pli valora por atingo de paco kaj konfido inter la popoloj;
- Ni notas, ke artefarita intelekto (AI) por maŝina tradukado kaj, helpe de tio, multlingva komunikado fariĝis malmultekostaj kaj vaste uzeblaj;
- Samtempe ni notas, ke la instigoj lerni fremdajn lingvojn malfortiĝas interalie pro la uzo de AI kaj reduktiĝas lingva egaleco, kondukante al kultura provincismo;
- Kun zorgo ni konstatas, ke estiĝas abundego da ciferecaj komunikiloj, per kiuj multaj homoj emas aliĝi al fontoj de informado kun samopiniaj grupoj, fortigante polusigon en la socio;
- Ni atentigas, ke Esperanto plene taŭgas kiel internacia lingvo kaj jam posedas tutmondan komunumon de parolantoj, kiu kiel movado subtenas respekton kaj valorigon de fremdaj lingvoj kaj kultura diverseco;
- Pro tio ni alvokas registarojn kaj la civilan socion en ĉiuj landoj:

- reveni al instruado ankaŭ de najbaraj lingvoj kaj enkonduki Esperanton kiel lernejan fakon por fortigi la senperan kontakton al najbaraj kulturoj kaj la neŭtralan alproksimiĝon al aliaj lingvoj; kaj
- labori por plifortigi la statuson de lokaj lingvoj kaj Esperanto kompare kun tiu de hegemoniaj lingvoj;

Ni konkludas, ke:

- reciproka konfido povas kontribui al harmonia, respektoplena, sekura kaj interkultura socia etoso kaj redukti la disdividajn fortojn en la socio;
- respekto por lokaj kulturoj portataj de lokaj lingvoj tiel plifirmiĝas, kaj samtempe socia kohero por paco fortiĝas;
- tiel la novaj komunikrimedoj helpos konstrui pontojn inter la popoloj, kaj la tendenco al bariloj kaj polusiĝo malfortiĝos.

Brno, 2025-08-01

Danaj partoprenantoj de la UK en Brno

Ni savu UNESKO-kurieron en Esperanto

Dum pluraj jaroj la revuo de Unesko aperas interalie en Esperanta versio. Estas grave montri al Unesko, ke ni vere estimas tion, por ne riski malaperon de la esperanta traduko pere de niaj ĉinaj amikoj. Por malhelpi ke tio okazus, estas dezirinde elŝuti ĝin el la retejo de UEA. Mi petis samideanon Stefan Keller ekspliki la manieron fari tion.
Jen:

1) iru al tiu paĝo: https://uea.org/revuoj/unesko_kuriero/2024

2) vi devas esti "ensalutinta" al tiu paĝo: supre, dekstre de la paĝo: "Vi estas ensalutinta" (se ne jam ensalutinta, klaku sur la butonon: "Eniru").

3) klaku sur la jaron "2024", aperas tio: "Numeroj de Unesko-Kuriero por 2024" kaj sub tio aperas la 4 numeroj de la Kuriero.

4) Sub la bildo de la kuriero elŝutenda, klaku sur: "Elŝutu de Unesko" – sekve de kio aperas la koncerna paĝo de la UNESKO-retejo:

En tiu paĝo, dekstre, en la supro de la nigra kadro, klaku sur la antaŭlasta butono: kiu afiŝas "download", au "télécharger", ktp., se vi iras kun la muso sur ĝin. Post klako sur tion, elŝutiĝas la pdf-versio de la Kuriero.

Reimagataj muzeoj: la laste aperinta eldono de Unesko-Kuriero

La cifereca revolucio ebligas al ni aliron al la verkaro de la plej gravaj artistoj, ĉiam kaj ĉie. Sed tamen, la plejmulto de la nuntempaj vizitantoj vicatendas dum horoj por vidi pentraĵojn aŭ skulptaĵojn, kiujn ili povus trankvile rigardi hejme sur ekrano.

“Estas vere, ke la nuntempaj muzeoj ne plu havas multajn komunaĵojn kun la pasintecaj kuriozaĵkabinetoj, rezervitaj por malmultaj privilegiitoj. Kiel vivantaj kaj malfermemaj institucioj, ili adaptiĝis konforme al siatempaj teknologiaj kaj sociaj defioj. Pli multe ol nur simplaj ekspoziciitaj vitrinoj por rigardo de vizitantoj, muzeoj iĝis kulturaj kaj ekonomiaj ĉefagantoj, kies altiran forton la urboj bone konscias”, – skribis Agnès Bardon, ĉefredaktoro de “Unesko-Kuriero”, en la ĉefartikolo de la kvara kajero de ĉi tiu gazeto (oktobro-decembro) por 2024, kiu kompletigis la jarkolekton.

La ĉefa temo de ĉi tiu eldono estas “Reimagataj muzeoj”. Ĝin traktas jenaj tekstoj en la sekcio “Larĝa angulo”:

“La muzeo agas kiel templo de kredo je la estonteco”: Intervjuo kun Krzysztof Pomian

Hannah McGivern. Vojaĝado tra la tempo kaj korpremaj rakontoj

E. B. Hunter. Memfotado en muzeoj: iom pli ol spegulo

“La movebla muzeo estas projekto, kie ni lernas tiom kiom ni enportas”: Intervjuo kun Nana Oforiatta Ayim

Rachel Felder. Muzeoj reskribas siajn historiojn

Lucía Iglesias Kuntz. Inoj eniras la bildon

Guo Yi. Ekspozicio de vivanta heredaĵo en Ĉinio

Caroline Wilson-Barnao. Bonvenon al la mondo de la morgaŭo

AlKo en la retejo de La Ondo de Espeanto

Kalendaro

La posedanto de la kelo en Carit Etlars Vej 6 mem volas uzi la lokon, kaj tial ni devas forlasi la ejon antaŭ la 1-a de novembro. SE IU EL VI KONAS TAUGAN LOKON POR KUNVENOJ, BONVOLU SCIIGI NIN.

Jen la kalendaro de KEK por la autuno. Ĉiuj estas bonvenaj.

Lundo 8 septembro en Carit Etlars vej 6

La "pasinta" somero: Partoprenantoj de la Universala Kongreso en Ĉehio kaj la Roskilde Festivalo rakontas. Eble ni spektas videojn de ambaŭ. Kaj kompreneble ni povas paroli pri la somero ĝenerale.

Jaŭdo 25 septembro en Carit Etlars vej 6

Babila vespero: temo: la Interreto.

La partoprenantoj rakontas:

Kiel mi uzas Esperanton en la reto.

La Interreto ĝenerale.

Iu fama persono diris en la jaro 1994: La Interreto estas taŭga por nenio. Ne validas uzi nek tempon nek monon por ĝi. Kiu diris tion? Nun aspektas ke la interreto estas inventita precipe por esperantistoj.

Lundo 6 oktobro en Carit Etlars vej 6

Muzika Vespero.

Elektitaj kantoj (aŭ peco de muziko) prezentataj de la partoprenantoj

Historietoj pri la muziko bonvenas.

Se vi ne havas kanton venu kaj aŭskultu la aliajn.

Ni povas ludi la kanton pere de USB aŭ retkonekto.

Muziko estas vere stranga fenomeno – same kiel lingvoj. Ĉi-vespere ni havas la eblecon kombini tiujn du strangaĵojn.

Lundo 20 oktobro en Carit Etlars vej 6

Programo ankoraŭ ne aranĝita

ĈAR NI DEVAS FORLASI LA KLUBEJON EN CARIT ETLARS VEJ LA 31-AN DE OKTOBRO LA SEKVONTAJ PROGRAMOJ NE ESTAS FIKSITAJ

Tamen, la lasta ĉi-jare estas:

14/12 ZAMENHOF-FESTO en Dalgas Have

Nova kursmaterialo

Mi anoncas, ke mi “verkis” Esperanto-kurson.

Ho ve, tiajn ni jam havas sufiĉe.

Jes, mi konsentas.

Sed – Cseh verkis sian unulingvan kurson por Esperanto-instruistoj, kiuj vojaĝis al diversaj landoj, kies lingvojn la instruistoj ne konis.

Nun la situacio estas kelkfoje inversa: Hejme ĉe la komputilo sidas instruisto kaj instruas klason kun lernantoj el diversaj landoj kaj kun diversaj lingvoscioj.

Ĝis nun mi nur aŭdis pri kursoj, kiuj en tiu situacio uzis helplingvon, kiu “kompreneble” estas la angla.

Pro tio mi nun verkis unulingvan Esperanto-kurson, kiu konsistas el amaso da bildoj. Bone, nomi la aferon kurso eble estas iom da fanfaronado. Ĝi estas la bildmaterialo, kiu helpos al instruisto, kiu scias unulingve instrui Esperanton al komencantoj.

La materialo estas elŝutebla ĉi tie:
https://mallonge.net/esperantokurso_per_bildoj



Vizito al la bieno Ågård de Michael kaj Victoria Branebjerg

Por la Ĉielirtago ni jam delonge interkonsentis fari ekskurson al tiu bieno en la kamparo.

Kiam ni alvenis, neniu estis hejme. Post mallonga tempo la familio revenis el la tereno kaj povis raporti, ke cervo troviĝis en ilia matriklo. Ĝia ido staris en la naturo, proksimiĝis al Michael kaj signalis per la okuloj “Helpu trovi mian patrinon”.

La herboj estis pli ol metron altaj. Michael per traktoro jam faris padojn al ni en la tuta areo por la gvidata rondiro.

Antaŭ kaj post tiu longa promenado ni kolektiĝis en ilia forcejo, kie tomatplantoj bone kreskas. Estas multaj fermeblaj fenestroj en la tegmento. Tie oni povas sidi kaj ĝui la naturon dum pluva kaj venta vetero.

Por ni la vetero estis bela. Ni estis grupo de de 11 personoj, inkluzive la edzinon kaj la du filinojn de Michael kaj Victoria.

Dum la promeno Michael klarigis pri la plantoj kaj siaj ideoj kaj planoj por la estonteco. Kelkajn el la plantoj ni gustumis.

Dum la kaftrinkado ni kun la gastigantoj interkonsentis ankaŭ venontjare ekskursi al ilia bieno.

Ni esperas tiam povi logi pli multajn partoprenantojn. Por tio ni ĝustatempe informu pri la ekskurso per la kutimaj komunikiloj. Ni anoncu ĝin en Esperanto en Danio kaj en februaro por ke homoj povu aliĝi kaj en majo por ke homoj memoru pri la evento.

Dankon al la tuta familio pro la gastemo, kaj bonan prosperon kun la projektoj. Mi sentas min privilegiita tiel povi sekvi tiun evoluon.

Jytte Sunekær

Danaj esperantoparolantoj en la kamparo

(Vidu ankaŭ la foton sur p.3.)

La 111-a UK okazos en 2026 – en Graz, Aŭstrio

Por la 111-a Universala Kongreso de Esperanto (UK) la Estraro de UEA elektis Aŭstrion kiel kongreslandon. La bela Graz (Graco) estos la kongresurbo.

Graz estas la ĉefurbo de la lando Stirio – de la Aŭstria Federacia Respubliko. Ĝia nomo devenas de la slovena vorto Gradec, kiu signifas “kasteleto”. Ĝi estas la dua plej granda urbo en Aŭstrio (post Vieno) kaj havas kvar universitatojn kun ĉirkaŭ 40 mil studentoj. Kun pli ol 900 jaroj de ekzisto, en 2003 Graz estis la Eŭropa Kultura Ĉefurbo. Ĝi estas listigita kiel Monda Heredaĵo de Unesko kaj Urbo de Dezajno, proponante al vizitantoj fascinan mikson de tradicio kaj novigado. Pro sia eventoplena jarkalendaro, turismaj vizitindaĵoj kaj larĝa oferto de notinda gastronomia diverseco ĝi ankaŭ estas konata kiel la Ĉefurbo de Ĝojo. Graciplena urbo.

Jam komence de 20-a jarcento estis komerca lernejo en Graz, kie oni instruis Esperanton. De tiam gastiĝis en la urbo pluraj Esperanto-eventoj, inter ili la Aŭstria Esperanto-Kongreso de 1913, 1926, 1949 (okaze de kiu la Aŭstria Poŝto eldonis poŝtmarkon kun verda stelo kaj la vorto “Esperanto”) kaj 2024. Ankaŭ la Internacia Junulara Kongreso de 1970 kaj la Jubilea Esperanto-Konferenco de 1987 (dum kiu Ivo Lapenna proklamis la malfondon de Neŭtrala Esperanto-Movado). Intertempe la Esperanto-klubo de Graz estas inter la plej aktivaj de Eŭropo. En 2023 aperis oficiala 42-paĝa gvidilo de la urbo en Esperanto. Tiu gvidilo estas internacie senpage mendebla ĉe la Turisma Oficejo de la regiono Graz. Graz havas Zamenhof-Esperanto-Objekton (ZEO-n), placon nomitan laŭ Esperanto: Esperantoplatz.

Entute vigla kaj turisma urbo, kun unika strukturo por vizitantoj kaj tradicia kaj aktuala Esperanto-movado. Tial UEA decidis akcepti la inviton de Aŭstria Esperanto-Federacio (AEF) kaj de la loka klubo por

kongresi en Graz en 2026 – pro kies invito UEA ankaŭ kore dankas. Ĉu ankaŭ vi partoprenos? La 111-a UK estas planata por okazi de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 2025. Reta aliĝilo por la 111-a UK aperos.

Gazetara komuniko de UEA

Graco invitas nin

Gvidlibro por umantoj

Kafumi... gustumi? Cerbumi. Aferumi, esperantumi, simple: umi. La sufikso -UM estas speciala afikso de Esperanto, kiu kontribuas en nia lingvo por la granda esprimkapablo de Esperanto. Pri ĝi, ĵus bakita elektronike, nun disponeblas al la komunumo, tute senpage la libro “Tiu ĉumalofta sufikso -UM”, de Anatolo Gonĉarov, nova literatura frandaĵo pri la uzado de la sufikso, en eldono aŭspiciata de UEA. La libro troveblas en la sekcio Teko de la retejo de UEA, kune kun aliaj senpage elŝuteblaj libroj: http://uea.org/teko/libroj.

Esperanto per komputilo

En la mondo estas iom hazarde kiuj helpiloj ekzistas por trakti la diversajn lingvojn komputile kaj poŝtelefone. Jen kelkaj konsiloj por Esperanto, ĉar la iloj ankoraŭ estas pli hazardaj ol tiuj por la dana lingvo.

Literoj

La unua kondiĉo por uzi Esperanton komputile estas, kompreneble, povi tajpi la literojn ĈĜĤĴŜŬ. En kelkaj komputilaj sistemoj, ekzemple tiuj de Mac aŭ Linux, ili estas elektebla parto de la normo. Tio havas avantaĝojn, sed ankaŭ estas iom rigida. Normale oni devas ŝalti de unu klavaro al alia kiam oni ŝanĝas lingvon, sed se oni aldonas eksternorman programeton, oni povas uzi la saman klavaron por skribi ekzemple danajn kaj Esperantajn tekstojn. Tiam la tutan tempon ĉiu klavo havas la valoron skribitan sur ĝin; sed mia klavaro estas produktita por la tuta Skandinavia merkato, do mi ĉiam hezitas inter Æ kaj Ø – problemeto kiun mi ne havas kun la Esperantaj vortoj!

En la Vindoza medio (Windows) la plej konvena kromprogrameto por ebligi Esperantajn literojn nomiĝas Tajpi. Bonan klarigon pri ĝi oni trovas ĉe pliejo.komputeko.net/tajpi-esperanta-klavarilo-por-vindozo, sed simple gugli “tajpi” kaj instali ĝin tute sufiĉas. Instalante oni mem elektas kiu signo metita antaŭ aŭ post CGHJSU transformu ambaŭ al ĈĜĤĴŜŬ. La plej multaj elektas X-on aŭ H-on post la sensupersigna litero. Oni ŝaltas kaj malŝaltas la programeton premante Ctrl + [ ] (t.e. la stirklavon kaj la spacklavon samtempe; sed ĉio estas agordebla, kaj eblas ŝalti kaj malŝalti ankaŭ per la muso).

“Tajpi” estas facila, fleksebla kaj preskaŭ perfekta. Tamen povas okazi ke ĝi ne funkcias, ekzemple se oni uzas retumilon kun aparte forta imuneco kontraŭ virusoj. Por tiu situacio mi rekomendas Esperanto Plus de Keyman (https://keyman.com/keyboards?q=esperanto). Ĝi taŭgas ankaŭ por ne-Vindozaj sistemoj kaj estas laŭ mi la plej konvena por poŝtelefonoj. En la telefono la sola malavantaĝo estas ke litero post punkto ne majuskliĝas aŭtomate, kaj en la komputilo ke la “mortaj” klavoj (por

fari ÉÄÜÖ) ne plu estas mortaj. Esperanto Plus integriĝas inter la jam ekzistantaj klavaroj kaj komputile oni saltas inter ili premante ⊞ + [ ] (t.e. la Vindozan klavon kaj la spacklavon samtempe). Se oni havas pli ol unu tian ekstran klavaron, eble estas pli konvene uzi la muson (menuero DAN aŭ ENG sur la malsupra trabo). Ne-Vindozaj komputiloj havas iom aliajn regulojn, ne tre familiarajn al mi.

Literum-kontrolo

Grava avantaĝo de Esperanto Plus estas ke la poŝtelefona versio enhavas literumkontrolilon, tiel ke oni ricevas sugestojn de plenaj vortoj surbaze de la unuaj tajpitaj literoj. Entute Esperanto nuntempe normale aperas en komputila listo de elekteblaj lingvoj, sed ofte mankas literumkontrolilo.

Esperanta literumkontrolilo mankas ekzemple en Word, la verkilo liverata kun la Vindoza programaro Office. Tial multaj Esperantistoj preferas Libre Office, senpaga programaro preskaŭ samfunkcia. Esperanto estas elektebla kiel tajplingvo kiam oni instalas la programaron, sed ankaŭ post la instalo (elektu Funktioner > Sprog > Flere ordbøger online en la dana versio). Tiam oni ricevas ruĝajn ondojn sub la (supozeble) misliterumitaj vortoj, precize kiel en danlingva teksto.

Se oni bezonas literum-kontrolon ankaŭ por siaj retleteroj, Esperanto Plus de Keyman estas helpa ĉe la telefono, sed por la komputilo oni devas instali Thunderbird. Pri ĝi mi tamen mem ne havas spertojn.

Vortaroj

Fine kelkajn vortojn pri retaj vortaroj, ĉar pri la Dana ni povas iom fieri. Ĉe vortaro.dk troveblas tradukoj el kaj en la Danan lingvon. Ĉe vortaro.net oni trovas klarigojn pri ĉiu vorto en Esperanto. Tre rekomendindas havi legosignon (bogmærke) al ambaŭ, komputile kaj telefone. Jen kiel fari sur iPhone:

1. Malfermu la apon Safari .
2. Entajpu vortaro.dk aŭ vortaro.net kaj premu Gå (Ek).

3. Premu la simbolon 🕮 (legosignoj).
4. Iru malsupren kaj premu la menueron “Føj til hjemmeskærm” (metu sur la hejman ekranon).

Jens Stengaard Larsen

Nova estraro de UEA

La 26-an de julio 2025 la Komitato de UEA elektis novan estraron por la Asocio. La nova Estraro de UEA enoficiĝis la 27-an de julio, post la fino de la dua kunsido kadre de la ĝenerala kunveno de la Komitato, kiam ĝi akceptis la raportojn de la tiame eliranta antaŭa estraro. La novan Estraron de UEA konsistigas: Fernando Maia Jr (Prezidanto), Seán Ó Riain (1-a Vicprezidanto), So Jinsu (2-a Vicprezidanto), Aleks Kadar (Ĝenerala Sekretario), Gong Xiaofeng Arko, Zdravka Boytcheva, Miora Raveloharison, Jérémie Sabiyumva kaj François Lo Jacomo.

La Estraro de UEA organizas sian laboron interalie per specifaj fakoj, en kiuj estraranoj superrigardas agadojn, kunordigas komisiitojn kaj mem engaĝiĝas.

Fernando Maia Jr.
- Kunordigo, Strategio kaj Statuta Reformo
- Rilatoj kun TEJO
- Aktivula Maturigo
- Ameriko

Seán Ó Riain
- Eksteraj Rilatoj
- Informado kaj Amikoj de Esperanto
- Revuo Esperanto
- Eŭropo

So Jinsu
- Kongresoj
- Azio kaj Oceanio

Aleks Kadar
- Administrado, Financoj, Centra Oficejo kaj Delegita Reto
- Faka Agado
- Reta Agado

Gong Xiaofeng Arko
- Instruado, Rilatoj kun ILEI
- Ekzamenoj, Rilatoj kun Edukado.net
- Rilatoj kun la Akademio de Esperanto
- Bibliotekoj, Esploro kaj Dokumentado, Rilatoj kun CED

Zdravka Boytcheva
- Kulturo
- Eldona Agado

Miora Raveloharison
- Universitata Agado
- Virina Agado
- Afriko

Jeremie Sabiyumva
- Landa Agado
- Meza Oriento kaj Norda Afriko

François Lo Jacomo
- Scienca Agado
- Esperanto-centro kaj ZEO-j
- Ĝemelaj Urboj
- Terminologio

Nova estrato de UEA

Returadresse:
Esperantoforeningen for Danmark,v/Claude Rouget
Stærvegen 63
NO-9015 Tromsø

Partoprenantoj de la UK en Brno